

DUMONATA ORGANO DE OOMOTO KAJ U.H.A.

Oomoto

1
9
7
3

jan.-feb.

Ora Jubileo de Esperanto en Oomoto

1923 — 1973

Eizo Ito

Historia tago estas la 27-a de majo, 1923. En tiu tago S-ino Akiko Kato, sekretariino de Majstro Onisaburo Deguĉi, ricevis de li komision, ke ŝi eklernu Esperanton. Kortuŝita de la honora komisio, ŝi tamen iom konfuziĝis, ĉar ŝi tute ne sciis kiel aliri por eklerni tiun fremdan novaĵon. Tri tagojn poste, kiam ŝi eliris el la centra preĝejo de Ajabe post fervora preĝo, ŝin renkonte alvenis kolegino, kiu transdonis al ŝi leteron senditan de S-ro Motoo Takami, studento de Kioto-Universitato. Ĝi kunhavis jurnaleltranĉon, anoncantan pri okazonta kurso de Esperanto: de la 1-a ĝis la 10-a de junio (1923). La problemo de S-ino Kato solviĝis je ŝia granda ĝojo. S-ro Takami estas neniu alia ol tiu, kiu poste edziĝis al Naohi Deguĉi kaj fariĝis Hidemaru Deguĉi. Do la majstroj, Onisaburo kaj Hidemaru, estas la kuniniciatintoj por la enkonduko de Esperanto en Oomoton.

Pli frue, jam dekelkajn jarojn antaŭe, Onisaburo ekkonis pri Esperanto el gazeta artikolo kaj parolis pri ĝia utileco al unu el siaj disĉiploj en la jaro 1918, sed ne al ĉiuj por ĝia ĝenerala akcepto, ĉar tiam en la Oomoto-centro ankoraŭ regis tro fermita rutinismo por akcepti tian “modernaĵon”, kia estas lingvo internacia. En la jaro 1922 lin vizitis F-ino Finch, misiistino de Bahaismo, kaj denove en 1923 kune kun F-ino Root. Ilia vizito portis al li informojn pri tiu nova religia movado, kaj nature ankaŭ pri “la mondlingvo”, kiun interalie rekomendis fervore ĝia fondinto, Baha Ullah.

Oomoto

48-a jaro

n-ro jan.-feb.
(391), 1973

Fondita en 1925

Redaktoro: T. Nakamura

Administracio: OOMOTO, Kameoka, Kioto-hu, 621 Japanujo.

Telefono: Kameoka (2) 5561. *Poŝta ĝirkonto:* Kioto 25637 (Oomoto).

Presisto: Tensei-ŝa, Kameoka

Jara abono: 1200 enoj aŭ 12,—ned. guldenoj, **Abonebla** ĉe niaj “Reprezentantoj” kaj ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002 Nederlando.

Rakontoj” la Oomotanaro rapide liberiĝadis el la rutinismo kaj tiun tendencon estis mirinde akcelonta la ĝenerala enkonduko de Esperanto.

S-ino Kato, kiu finis la kurson en Kioto, revenis hejmen al Ajabe, tute konvertita al la nobla ideo de Homaranismo kaj Esperantismo. Senprokraste oni decidis okazigi kurson por ĉiuj Oomotanoj tieaj. Ĝi okazis inter la 1-a kaj 7-a julio, sub la gvido de la speciale invitita studento de Doŝiŝa-Universitato, Kioto, nome S-ro Takizo Ŝigemacu kaj kun partopreno de pli ol cent Oomotanoj — viroj kaj virinoj, maljunuloj kaj junuloj kaj eĉ malgrandaj geknaboj, krom la Majstro mem kaj eminentaj estraranoj. Jam eksonis agrablaj salutoj en Esperanto kiel en la domoj tiel ankaŭ sur la vojoj en la komunumo de Oomoto ĉe Ajabe. Fondiĝis Esperanto-Societo de Oomoto, kiu poste evoluis al Esperanto-Propaganda Asocio, sub la prezidanteco de S-ro Uĉimaru Deguĉi kaj kun pli ol cent lokaj filioj sinsekve fonditaj tra la tuta lando.

Ĉe la Granda Aŭtuna Kunveno de Oomotanoj en 1923, Onisaburo deklaris, ke li etendos la Oomoto-movadon eksterlanden per Esperanto, kaj samtempe disvastigos la lingvon ne sole tra Japanujo, sed ankaŭ al Koreujo, Ĉinujo k. t. p. kaj eĉ “malimportos” ĝin returne al Eŭropo el kie ĝi venis. Li asertis, ke post dek jaroj tiuj, kiuj ne povoscias Esperanton, fariĝos “postdatuloj”.

Intertempe Oomoto renkontis fortan persekuton de la registaro, kaj la I-a Oomoto-Afero okazis en 1921. Tio kaŭzis malfacilaĵojn por la propaganda agado precipe en la lando. Onisaburo utiligis tiun tempon por interne reeduki la Oomotanaron, kiu ĝenerale estis bigota kun la kredo, kvankam fidela kaj pia, tamen ne kapabla ĝuste kompreni la profundan signifon de la Sankta Skribo de Nao, la fondintino. Sub la inspiroj de Dio, Onisaburo komencis verki per diktado volumojn de “La Rakontoj el la Spirita Mondo”, kiu estas la vera komentario kaj signifoklarigo pri la Sankta Skribo, kies esprimoj ofte estas tiel simplaj kaj simbolaj, ke okazis miskomprenoj ĉe homoj, kiuj ankoraŭ ne estas sufiĉe edukitaj spirite. Dank’ al “La



La Publika Domo de Kameoka, ĉi-jara E-Kongresejo Japana

Li havis superan talenton en versfarado. Baldaŭ post la unua E-kurso venis al li en la kapon ideo verki 31-silabajn utaojn, por faciligi al ĉiu ne tre talenta lingvo-lernanto la memoradon de Esperantaj vortoj, kombinante, por ĉiu vorto, la Esperantan elparolon kaj ĝian sencon vortolude. Sed la verkado de “La Rakontoj” urĝis lin : li verkis multajn volumojn per mirinda rapideco de diktado, t. e. ĉiun 360-paĝan volumon en meze tri tag-noktoj. En la mezo de tia terura okupiteco li ĉiutage dediĉis iom da tempo, aŭ en la hejmo aŭ en la trajno, por fari utafaradon kaj daŭrigi ĝin, ĝis fine, jam en novembro 1923, li sukcesis verki entute 3,600 pecojn por tiom da oficialaj vortoj. Tiuj estis poparte publikigitaj en la sinsekvaj numeroj de la periodaĵo de Oomoto ; kaj en januaro de 1924 la tuto estis libroforme eldonita kiel la “Poemaro japana por facila memorado de Esperantaj vortoj”. Kredeble, tute unika vortaro en la mondo !

Post la unua E-kurso en julio (1923) ĉe Ajabe, en aŭgusto okazis la dua intensiva kurso sub la talenta gvido de S-ro Tadakacu Juri, studento de Komerca Universitato de Tokio. Li poste energie helpadis nin ne nur per ofta kurso-gvido, sed ankaŭ per tradukado el la sanktaj skriboj de Oomoto. Li nun loĝas en Londono kaj, vojaĝante de tempo al tempo al diversaj landoj, verŝajne ĝuas la plej feliĉan esperantistan vivon.

En septembro oni delegis S-ron Koogecu Niŝimura al la 11-a Japana

Esp.-kongreso en Okajama. Post nur dumonata lernado li bone parolis kaj montris la mirindan facilecon de nia lingvo. Sammonate, okazis publika kunveno en la ĉefpreĝejo de Ajabe, kie prelegis pri Esperanto kelkaj studentoj de Kioto-Universitato, nome: S-ro Iĉiro Sakurada (nun honora profesoro de tiu univ.), S-ro Ĉuji Iizuka kaj S-ro Hideo Jagi (iama Prezidanto de U. E. A.).

En oktobro, Onisaburo kune kun kelkaj Oomotanoj ĉeestis la kunvenon de Esperantistoj en Kioto; poste li invitis ilin al Kameoka por ekskurso de macutaka (pinfunga) kolektado. Fine de tiu monato, li en akompano de sia sekretariino vizitis la filion de Oomoto en Osaka. (Estis ja tiam, ke mi havis la ĝojon unuafoje vidi la Majstron kaj aŭskulti lian parolon pri nia lingvo.)

Rapide foliumante la tiutempajn numerojn de la periodaĵo de Oomoto kaj simple citante, kiel ĉi-supre, el la raportoj pri Esperantaj aferoj, mi miras pri la rapideco kaj vicleco, per kiu nia afero progresis en la daŭro de nur duona jaro komenca.

En la marta numero, 1924, de "Esperanto" de U. E. A. aperis artikolo pri la "novspirita movado Japana, kiu enkondukis Esperanton", verkita de S-ro H. Jagi. Sekve, el diversaj partoj de la mondo venadis al Ajabe leteroj petantaj pli detalan informon. Tuj fondiĝis la eksterlanda fako por okupiĝi pri korespondado, tradukado, redaktado k. t. p. Baldaŭ eldoniĝis la unua libro en Esperanto: "Kio estas Oomoto", verkita de S-ro T. Juri; kaj oni komencis eldoni la monatan revuon "Oomoto" kaj ankaŭ la monatan organon de E. P. A.: "La Verda Mondo".

La 9-an de junio, 1925, fondiĝis la Universala Homama Asocio. Nur tri tagojn poste, S-ro K. Niŝimura forvojaĝis al Eŭropo, por partopreni la Universalan Kongreson en Ĝenevo. Tie li estis varme akceptita kaj ricevis la honoron elektiĝi kiel vicprezidanto de la kongreso. Poste li veturis al Parizo, kie li fondis la Eŭropan Centron de Oomoto kaj eldonadis la monatan organon "Oomoto Internacia". Tiu periodaĵo akiris vastan legantaron kaj bonkorajn kunlaborantojn inter la esperantistoj ne nur en Parizo, sed ankaŭ el diversaj partoj de la mondo.

En 1926 oni subskribis Amikan Kontrakton inter Oomoto kaj Blanka Standardo de Germanujo kaj Blanka Frataro de Bulgarujo, kiuj ambaŭ uzas Esperanton, kiel montras iliaj nomoj mem. Baldaŭ oni iniciatis starigon de Domo de Homamo, kie oni povos amike kunvenadi sen distingo je religio, lingvo, raso k. t. p. Responde al nia alvoko el Parizo venis multaj brikoj, konstruprojektoj kaj eĉ donacpropono de tereno por la Domo, el diversaj partoj de Eŭropo. Dume en Japanujo la eksterlanda fako trans-

lokiĝis de Ajabe al Kameoka, kien baldaŭ alvenis S-ro J. Major, hungara esperantisto, por redakti la monatan organon "Oomoto", kiu ankaŭ ĝuis ĉiam pli favoran reputacion.

Sed baldaŭ la politika situacio de Japanujo fariĝis malfavora por nia afero, kaj en 1933 nia Eŭropa Centro devis esti fermita. Nur tri jarojn poste, 1935, la tuta organizo kaj movado de Oomoto renkontis la barbarisman persekutadon de la japana registaro kaj polico, kaj tiel komenciĝis la II-a Oomoto-Afero.

Daŭris dek jaroj nigre mallumaj; intertempe eksplodis kaj finiĝis la Dua Mondmilito. Oomoto reliberiĝis. Sed pro la urĝaj laboroj por reorganizado kaj rekonstruado de domoj kaj instalaĵoj, ni devis atendi ĝis 1950 por rekomenci la laborojn por kaj per Esperanto.

Refondiĝis Esperanto-Propaganda Asocio, kiu eldonas la monatan "Nova Vojo", kaj reeldoniĝis la revuo "Oomoto", kiel vi scias. Ni volus menciigi pri sufiĉe multaj aferoj, kiujn ni plenumis dum la lasta kvaronjarcento post la milito; sed ni ilin preterlasos por la nuna momento, ĉar ili estas relative freŝaj kaj pli-malpli konataj de niaj legantoj.

Mi skizis nian historion foje detale, foje maldetale, kaj timas ke tio tediĝis niajn legantojn. Sed bonvole komprenu, ke mia intenco estis iom revoki al nia memoro la etoson, virgan kaj naivan (en la nobla senco de la vortoj!), kiu regis en la unuaj jaroj de Esperanto en Oomoto, kaj ĉerpi el ĝi valoran lecionon por refreŝigi nian forton kaj rekuraĝigi nin al plua laborado per kaj por Esperanto.

Retrorigardante la pasintajn 50 jarojn, ni nun sentas la agrablan devon esprimi niajn elkorajn dankojn al tiuj multaj gesamideanoj, kiuj tiel bonvole helpis kaj kunlaboris al ni. Bedaŭrinde multaj el ili jam ne vivas inter ni, sed konsolas nin la fakto, ke eĉ pli multe da novaj kunlaborantoj apogas nin.

En la venonta aŭgusto ni solene festos la Oran Jubileon de Esperanto en Oomoto. Kaj estas decidite, ke ni havos la ĝojon tiam bonvenigi la 60-an Japanan Esperanto-Kongreson ĉe Kameoka (de la 11-a ĝis la 13-a). Kune kun ĝia Preparkomitato ni deziras fari ĝin epokfara evento por forte antaŭenpuŝi la movadon.

Al nia Ora Jubileo kaj al la 60-a Japana Kongreso ni kore invitas kaj atendas la aliĝon de kiel eble plej multaj gesamideanoj ne nur en Japanujo, sed ankaŭ el landoj najbaraj kaj eĉ malproksimaj!

La signifo kaj koncepto pri *kami* en Japanujo^{*)}

Unu el la plej malfacile difineblaj vortoj en la japana lingvo estas la vorto: *kami*. La kanjio¹⁾ uzata por tiu vorto (神) estas prononcata *sen* en la ĉina kaj havas malsaman signifon, ne tiel ĉioninkluzivan kiel la japana vorto skribata per la sama simbolo (神). La *sen* origine signifis “fulmo”, kaj poste uzatiĝis por esprimi ĉiujn nesondeblajn fortojn de la naturo. Dum la Ĉou-epoko en Ĉinujo ĝi estis difinita kiel *ling* (靈), kiu havis la ĝeneralan signifon de “spirito” aŭ “mistera”, kaj la kumetaĵo *lingsen* signifis: “mistera spirito aŭ dio”. *Sen* en la ĉina ne inkludis la signifon de *kuei* 鬼 (jap. *ki* aŭ *oni* 鬼), malbona spirito, kiun ampleksas la signifo de *kami*. Krome, la signifo de *kami* enhavas tiajn nociojn, kiel la ĉina *tien* 天, ĉielo (jap. *ten* aŭ *amacu* kiam tiu vorto estas uzata kiel la epiteto de la estaĵoj en ĉiela loĝejo); *hsien* 仙 (jap. *sennin* 仙人), nemortemulo en tia sama senco, kiel ĝi estas uzata en Taoismo; *tū* 巫; ŝaman(in)o, aŭ kiu iĝas posedita de spirito, ktp. En la ĉina Jin-Jang-filozofio, la *sen* estas partoj de “Jang” kaj la *kuei* estas elementoj de “Jin”. Ĉiuj tiaj koncep-

toj povas esti iam enkondukitaj en Japanujon, kiel tion evidentigas la adopto de la kanjio *kuei* 鬼 por la japana vorto *oni*, kaj ankaŭ la ekzisto en Ŝintoa filozofio de tiaj konceptoj kiel: *oni* aŭ *aŝiki kami* (malbona spirito), en kontrasto al *naohi no mitama* (pura spirito); kaj tamen la ĝenerala koncepto pri *kami*, kiu ampleksas ĉiujn spiritojn kaj bonajn kaj malbonajn, ŝajnas jam ekzistantaj vaste en Japanujo ekde frua antaŭliteratura tempo.

Kami estas la ĝenerala vorto de respekto por io dia aŭ timiga, sed ĝi ne estas speciala termino por difinita ordo de estaĵoj. Inter la miriadoj da aferoj en la universo oni rekonis kiel ekzistantajn kaj funkciantajn la diajn spiritojn kaj misterajn fortojn, kaj ilin nomis *kami*. El tio sekvas, ke la montoj, riveroj, oceano, kampoj, birdoj, geografiaj regionoj, ktp estas *kami* en la senco, ke spiritoj loĝas en ili. Same, la nuboj, la pluvo, la suno, la tondro, ktp estis respektataj kiel *kami*, havantaj misteran spiritan forton. Ĉiujn animalojn, plantojn kaj mineralojn oni diferencigis, kaj ili portis siajn proprajn nomojn de *kami*.

*) El la anglalingva “Oomoto”, n-ro nov. - dec., 1972.

La vorto *kami* estas honora esprimo uzata por respekte montri al diversaj estaĵoj, sed neniu aplikas tiun vorton al si mem, nek al siaj egalajoj krom en esceptaj okazoj. Tamen, estaĵo, kiu ne nomas sin *kami*, nek konscias sin kiel tia, povas esti nomata *kami* fare de aliaj estaĵoj. Nature, tiuj estaĵoj, kiuj rivelas speciale elstaran, mistikan aŭ okultan povon, grandajn artojn, aŭ kosman konscion, estas ofte nomataj *kami*; sed ne ĉiuj estaĵoj, kiuj estas nomataj *kami*, havas tiun aŭ alian elstaran superecon, ĉar kelkfoje la mal-superaj aŭ malplifortaj ol la parolanto estas nomataj *kami* el la sento de respekto por iliaj spiritoj. Ĉiuj aferoj esence estas individuaj spiritoj kaj povas esti respektataj kiel *kami*. Kaj ankaŭ homoj, kiel ĉiuj aliaj estaĵoj, povas esti nomataj *kami* kaj efektive tiel estis nomataj.

El la vidpunkto de la principo de Dualista Monismo, la plej simpla, ĝenerala kaj ĉeftrajta signifo de

kami povas esti eltirita el la sonoj mem de la vorto. Ĉar ĉiuj vortoj de la japana lingvo — lingvo kiu konsistas el kvindek silaboj — estas konstruitaj kun interna koherco diverskonsista. Tio estas, la sono de ĉiu silabo havas sian propran signifon kaj apartan aludon, kaj ĉiuj malsamaj vortoj, en kiuj la sama sono estas uzita, havas rilatan signifon. La sono *ka*, ekzemple, aludas pri centripeta movo de io en sin mem aŭ la kaŝita-kaj-nevidebla, kiel en la vorto '*kakusu*', kiu signifas: kaŝi. La sono *mi* aludas pri la videbla kaj palpebla, kiu havas materian substancon, kaj mem estas la vorto signifanta: korpo. La vorto *kami* do aludas pri io, kio estas unuiĝo de la videbla kaj la nevidebla.²⁾ La universo, kiu konsistas el materio kaj energio, estas "kiel tuto... *Kami*". Kiel la Senlimo "nevidebla kaj tamen entenanta en si la limitan relativan mondon" estas *Kami*, tiel ankaŭ la homo "mem videbla, kaj tamen potencie

1) *kanjio*: japana nomo de "ĉina ideogramo" (Kp kanao). — Noto de la Trad.

2) El la Oomotisma vidpunkto de tia Signifklarigo pri la Japanaj Parolsonoĵoj (言靈解), Eizo Ito, en sia prelego ĉe l' Oomoto-Internacia Festivalo, 1965, klarigas la signifon de *hito* (homo) jene:

"La japana vorto por homo estas *hito*. Per analizo de vorto ni ofte kaptas ĝian pli profundan, originan sencon ol kian oni ordinare al ĝi atribuas. *Hi* signifas 'suno', 'fajro', 'dia spirito', 'dio'; *to* signifas 'haltejo', 'pordo', 'restadejo'. Do, *hito* estas 'haltejo de dia spirito' aŭ 'restadejo de Dio' (p.144, "Oomoto", 1965)". Tio estas 'restadejo de *kami*'!

Eble pro tia karaktero de la japana lingvo (en kiu *koto* 言 aŭ parolsono homonime identas kun *koto* 事 aŭ afero), la japanoj diras: *La nomo* (vorto) *montras la esencon* (名は実を表わす). Sed notindas, ke, ĉar la kombino de la 50 silaboj, kiuj konsistigas milojn da pradevenaj vortoj, estas malsimpla, la signifo de ĉiu silabo estas multesenca.

— Noto de la Trad.

kapabla enteni en si ĉiujn aspektojn de la nevidebla mondo” estas kami. Homo realigas sian kamiecon en plena mezuro, nur kiam li komprenas sian veran naturon kaj metas ĝin kiel ‘estron super ĉio’ en sia centro.

Kiel jam aludite, kami povas esti komprenata kiel spiritoj enkorpiĝintaj en la objektoj aŭ fortoj de la naturo, kaj tial ni havas tiajn kami, kiel: la kami de monto (*jamacumi no kami*), la kami de tondro (*naru kami*), la kami de tertremo (*nai no kami*), ktp. Primitiva praulo ĉie, kiam li renkontis la objektojn kaj fortojn de la naturo, kiuj estis nesondeblaj per sia scio, rigardis ilin respekte kiel ion misteran kaj dian. Ankaŭ en Japanujo oni rigardis ilin kiel *kami*.

Tiuj *kami* dividiĝis en du klasojn: “*amacu kami*” aŭ tiuj kami ligitaj kun la ĉielaj objektoj kaj fortoj, kaj “*kunicu kami*” aŭ tiuj kami ligitaj kun la surtera ekzistado. Fakte, la legendoj de la frua periodo, kiaj estas rakontitaj en la Kojiki, la Nihongi, la Kujiki kaj la tekstoj de simila speco en Japanujo kaj alilande, okupiĝas pri ambaŭ specoj de kami. En la Ryukjua Ŝindoki kaj en la Omoro de Okinavo oni faras similan klasigon: *amami kami* aŭ *ting nu kami* (la ĉiela kami) kaj “*jii nu kami*” (la tera kami). Ankaŭ en la korea tradicio troviĝas simila klasifiko: “*ĉunha dae janggun*” (granda generalo de la ĉielo) kaj “*ĉi ha dae janggun*” (granda generalo de la tero).

Ekde la tempo kiam homoj komencis vivi en loĝejoj, evoluis la koncepto pri kami kiel la gardantaj spiritoj. La gardospirito de la fajrejo aŭ de la domstrukturo (la gardospirito de la fajrejo havas plifruan tradicion) estas la ĉefa kami inter amaso da domgardantaj *kami*. En Okinavo, la kami de la fajrejo, nomata “*fii nu kang*” (la fajro-spirito) estas la ĉefa objekto de kulto en la domo, dum en Koreujo, la spirito de la domstrukturo, nomata “*sōng-ju*” estas kultura en simila maniero.

En Japanujo la domo estas protektata de “*kukukitaka-muro-tunane no kami*”; ĉi tiu estas la gefrataj kami: “*okicuhiko no kami*” kaj “*okicuhime no kami*” (la kami de la kuirejo kaj tiu de la fajrejo), kiuj ludas la ĉefan rolon kiel domgardantaj spiritoj. La gardospiritoj de la domo estas tre multaj, kaj rimarkinda estas la simileco de iliaj aktivecoj en Japanujo, Okinavo³⁾ kaj Koreujo. En tiuj tri landoj oni okazigas specialan riton por domkonstruado kaj instalado de kuirfajrejo. Inter la aliaj plej gravaj gardospiritoj menciindas: la kami de la necesejo (“*kutami no kami*”), tiu de la enirpordo (“*ujimo-kami*”), tiu de la puto (“*mii no kami*”).

Krom la domgardantaj spiritoj, menciitaj ĉi-supre, troviĝas la prapatraj spiritoj; sed en Japanujo, Okinavo kaj Koreujo oni kultas ilin laŭ Budhista maniero en sia domo ĝenerale, kaj ili formas grupon da spiritoj, kiu estas aparta de la domgardantaj kami.

Tamen, la gardantaj kami ne estas sole tiuj de la domo, ĉar troviĝas ankaŭ la gardanta kami de la klano, nomata en la japana: *uji gami* (<ujikami), kiu per posta evoluo nun koincidas kun la protektanta kami de vilaĝo (*ĉinĵu no kami*) aŭ tiu de naskiĝloko (*ubusuna no kami*), ktp. Origine tiuj estis la gardantaj kami de la tribo aŭ klano, sed nun estas la objekto de komuna popolkulto en tuta geografia regiono, kaj rigardataj kiel la komuna protektanta dio de komunumo. Ne eblas listigi ĉi tie ĉiujn specojn de *uji gami*, kiuj ekzistas, sed menciindas pri la *uji gami* de certaj komercoj, metioj kaj profesioj. Unu tia gardanta kami estas *Ame no uzume no mikoto* (virino), la gardospirito de profesiaj kantistinoj, dancistinoj, muzikistinoj, aktorinoj, prostituitinoj, gejšoj, ktp. Tiu diino estas tre fama pro tio, ke ŝi per dancado sukcesis elogi *Amaterasu Oomikami* (la Sun-Diino) el interne de la ĉiela rokkaverno, en kiun tiu sin kaŝis.

Troviĝas multaj aliaj, kiel: *kuguri gami*, la gardospirito de plongistinoj (kiuj submare kolektas konkojn kaj marherbojn), *iŝikoridome no kami*, la gardospirito de spegulfaristoj, *kanajamahiko no kami*, la gardospirito de ministoj, ktp. Estas notinde, ke multaj el tiuj spiritoj estis origine rigardataj kiel simboloj de la fortoj kaj objektoj de la naturo, sed poste fariĝis la *uji gami* de aparta komunumo.

Ĝis nun, ni pritraktis la naturon de la indiĝenaj kami en Japanujo. La influoj el eksterlando estis tre multaj kaj ŝanĝis rimarkinde la naturon de la koncepto pri kami en Japanujo en la daŭro de jarcentoj. Probable la plejfrua influo sur la indiĝena japana kulturo, se ne enkalkuli la interinfluojn de multaj diversaj klanoj, estis la adopto el la aina popolo la ideon pri *kicune* kiel kurier-spirito de la agrikultura kami *inari*. Kvankam oni diskutas pri la vereco pri tio, tamen estas notinde, ke la okinavanoj, fratoj de la japa-

3) Okinavo, la ĉefa insulo de la Rjukjua arkipelago kuŝanta en okcidenta Pacifiko, inter Kjuŝuo kaj Tajvano (Formoso), entute estas japana gubernio Okinavo kun ĉ. miliono da loĝantoj. Post la Dua Mondmilito ĝis 1972 ĝi estis sub la milita administrado de Usono.

La rjukjua (aŭ okinava) lingvo kaj la japana lingvo estas tiel parencaj, ke la lingvistoj ofte pritraktas la unuan kiel la "rjukjuaj dialektoj" (琉球方言) en komparo kun la (japanaj) "ĉeflandaj dialektoj" (本土方言). Oni facile povas konstati ilian parencecon eĉ el la kelkaj ekzemploj donitaj ĉi-supre de l' aŭtoro; atentu precipe la vokalsanĝon de *o* al *u*, kio estas karakteriza diferenco fonologia inter ambaŭ grupoj de dialektoj:

JAPANA	amacu kami	ten no kami	Ji/ĉi no kami
RJUKJUA	amami kami	ting nu kami	Jii nu kami
	(ĉiela kami)	(kami de ĉielo)	(kami de tero)

— Noto de la Trad.

noj, ne havas tiun tradicion. La koncepto pri inari (kiel kurier-spirito) modifiĝis post la enkonduko de la rakontoj pri “vulpo” el Ĉinujo. Mi rimarkigas, ke la vulpo-posedo estas unu el la plej oftaj fenomenoj de *kamigakari* (posedo de homo fare de spirito) en Japanujo.

Pliaj fremdaj influoj venis eble kun la enkonduko de Taoista filozofio kaj la kulturo de la Han-epoko de Ĉinujo, kaj poste kun la enkonduko de Budhismo en Japanujon en la Nara-epoko.

El Ĉinujo enkondukiĝis multaj konceptoj — koncerne “kami” — kiuj diferencis de la indiĝenaj japanaj konceptoj. Inter tiuj konceptoj, kiuj multe influis Japanujon, estis la koncepto pri la imperiestro rigardata kiel diulo, la koncepto pri la kami-igo de la naciaj herooj kaj personoj respektindaj pro siaj grandfaroj, kaj la koncepto pri tio, ke oni rigardas kiel kami la personojn, kiuj atingis la staton de kompreno pri sia dia memo, en la sama maniero, kiel la Taoistoj rigardis *hsien* kiel dian.

Krom tio, kun la enkonduko de Budhismo kaj ĉinaj religiaj ideoj granda nombro da diaĵoj de ĉina kaj hinda origino estis akceptitaj kiel la kami de la japanoj. Kelkaj el la plej popularaj estas: *Konjin*, la diaĵo de ĉinaj Jin-Jang-divenistoj, *Daibonten* aŭ Bramo, la hinda diaĵo en la kreado, *Kiŝŝōten* aŭ Lakŝmo, la hinda diinaĵo de fortuno, *Benzaiten* aŭ Sarasvato, la hinda diinaĵo de la scio, *Kiŝimojin* aŭ Harito, la

hinda diinaĵo kun kvincent infanoj, *Biŝamonten* aŭ Vaiŝravano, la hinda subiganto de Jakŝoj (monstroj) kaj Raksasoj (malhomoj), *Tengu* aŭ la ĉina *T'ienhu* (supernatura estaĵo), ktp. La korea spirito de la vojoj kaj montpasejoj, *Sunang* transformiĝis en la japanan diaĵon de la vojoj, nomata *Ĉiburi no kami*.

Multe pli-malfrue en la japana historio, la enkonduko de Kristanismo kaj Eŭropa Filozofio, precipe dum la pasinta jarcento, faris rimarkindan influon sur la koncepton pri kami ne nur en la grupoj de Jaŝira Ŝintoo kaj Sekta Ŝintoo, sed ankaŭ en la Novaj Religioj.

Hirata Acutane kaj lia skolo ricevis grandan influon de tiaj fremdaj eŭropaj konceptoj, Hirata rigardis la vivon kiel la aperon de homo en la mondon per la kreipovo *musubi* de Kami, dotite per koranimo (*ŝinkon*) kun kvar elementoj, el kiuj ĉiu estas regata de respektiva kami. Laŭ li, la plej grava elemento estas vento: t. e. la spiro liverita el la Elspirado de *Izanagi*. Laŭ li, la mondo de la nevideblaj kaj misteraj akiras la superecon super la mondo de la videblaj; la dieco de *Ookuninuŝi no kami*, kiu, laŭ li, regas nevideblan kaj misteran mondon, fariĝas pli alta ol tiu de la ĉi-mondeca kami. Graco (*onrai* 恩頼) de la kreipova spirito (*musubi*) aŭ difavoro (*miucukuŝimi*) fariĝas la ĉefaĵo de “nevidebla regado”, kaj ĝin Hirata rigardas en kontrasto kun la meritoj de fideleco kaj sincereco en la mondo de la mortemuloj.⁴¹

Inter la Sekto-Ŝintoaj gvidantoj, Kurozumi Munetada, la fondinto de Kurozumi-kjo, ŝajnas la unua por esti influita de la nova koncepto pri kami. Li kantas per tankaĵoj:

Amaterasu

*Kami to hito to ūa
hedate naku,
suguni Kami zo to
omou ureŝisa.*

(Ho, kia ĝojo,
nenio baras inter
Amaterasu
kaj homo: tiu dia
samkiel la Alia!)

Ĉihajaburu

*Kami no umidasu
umi no ko jo,
Oja no kokoro o*

itamaŝimuru na.

(Ho vi infanoj,
naskitaj el Kamio,
neniam kaŭzu
ĉagrenon al la koro
de via Patrodio.)

Li firme kredis, ke la naturo de Kami estas samtempe “transcenda kaj imanenta”. En li la nevidebla Patro-Kami *Amaterasu Oomikami* kaj la propreco de la suno estis tiel kohere unuiĝintaj, ke li kultis la sunon kiel la komunan fonton de la lumo, varmo kaj vivo, kaj tiel atingis la finan konvinkon, ke ĉiuj estajoj estas la infanoj de Kami, kaj ke la homo devas esti harmonia kaj unu kun Kami.⁵⁾

Sekvante la similan penson, Oomoto tamen ne apartigas monote-

4) Hirata Acutane (1776–1843) probable studis la kristanajn ideojn kaj eŭropan sciencon pere de ĉinaj verkoj ankoraŭ en la tempo, kiam troviĝis dise la kaŝaj Kiriŝtanoj (vd en la Enciklopedieto Japana), sed pli frue ol la enkonduko de Kristanismo, kiu datiĝas de 1859. Tamen la teorio de Hirata kaj liaj sekvantoj (ekz-e pri la sankta karaktero de la japana nacio) poste kontribuos, almenaŭ parte, al la restarigo de la Imperia reĝimo en 1868 kaj influos sur la religian politikon de la nova registaro. Cetere vd la Piednoton 8. — Noto de la Trad.

5) Kio rimarkindas pri la kredesprimo en tiuj poemetoj de Kurozumi Munetada (1779–1849), estas la fakto, ke li adoras Amaterasu Oomikami ne kiel la “prapatran kami de la Imperia familio”, sed — el sia purreligia konvinkiteco — kiel la regantan (Amaterasu = Ĉielbrilan) Kami de la universo, kaj tiun li nomas “Oja”. La japana vorto *oja* (親) ne havas ekvivalenton en Esperanto: ĝi ne estas specife patro nek patrino, sed foje patro aŭ patrino, foje ambaŭ, foje prapatro(j), kaj nun — “Dio”. Mi esp-igis ĝin: (via) *Patrodio* laŭ la koncepto monoteisma ĉe Kurozumi, sed ĝi havas *nenion* komunan kun la kristana koncepto pri “Patro-Dio”. La kristanoj estas la gefiloj adoptitaj per interligo en la familion de la Patro-Dio. Tamen, por la interligiteco de *oja* 親 kaj *ko* 子 (infano aŭ infanoj) estas bezonata nenia “arango” aŭ “interkonsento”, ĉar ĝi estas — se ne diri destinita — nur denaska kaj natura. Mi opinias, ke Kurozumi ricevis por sia koncepto pri Kami nenian influon de “fremdaj eŭropaj konceptoj” pri Dio.

— Noto de la Trad.

isionon disde politeismo. Oomoto instruas, ke ĉiuj estaĵoj estas el la unu kaj sola Kami. Ekzemple, la homa spirito, vivanta kiel en la spirita mondo, tiel ankaŭ en la fizika mondo, estas parto de la Spirito de Kami: nenio dividas inter ili, tial ili ne estas apartaj estuloj.⁶⁾

Simile, Jonosuke Nakano, la fondinto de Ananai-kjo, diris, ke la spirita mondo de la Kosmo konsistas en la agado de Kami. Li diris ke li bone komprenas la spiritan mondon, sed apenaŭ povas esprimi ĝian aktualan staton klare, ĉar la suno, la luno, la steloj, kaj la tero en la Kosmo, ĉiuj kune, estas la bildo de Kami, kiu agadas en la Kosmo per tiuj organoj (ĉiu el kiuj estas nedisigebla de la tuto) kaj kiu estas la sistemo de la Kosmo; kaj la spirita agado de tiu ĉi sistemo estas la spirita mondo de Kami nomata *Amacu Kami*.⁷⁾

Restas pritrakti la koncepton pri vir(in)o, kiu estas en la stato de *kamigakari* (kamiposedo) kaj rigardata kiel kami. En Antikva Japanujo virinoj servis kiel *kamiko* aŭ *kannuŝi*, kiuj iĝis poseditaj de sia gardanta kami kaj estis rigardataj kiel kami de iliaj sekvantoj en la

klano. Tiu ĉi koncepto pri kami preskaŭ malaperis el Japanujo hodiaŭ: ĝi restas nur en la kutimo de la konsekrita imperia princino ĉe la Ise-Jaŝiro. Sed en la regionoj, kie troviĝas la parenca religia kutimo, kiel Koreujo kaj Okinavo, tiu koncepto ankoraŭ persistas. En Koreujo la *mudang-on* ekposedas ŝia *momju*, kaj en Okinavo la *kaminĉu-on* ekposedas ŝia *ĉiji*.

Kompreneble, la granda fondintino de Oomoto devas esti rigardata kiel granda ekzemplo de tiu ĉi koncepto pri kami. Efektive kiel tio estas la antikva tradicio de Japanujo, Okinavo kaj Koreujo, tiel en la praktiko ŝajnas ke virinoj pli taŭgas por iĝi kami-poseditaj kaj plenumi kiel kami dian taskon elmontri la mirindaĵojn de la nevidebla kaj mistera mondo de Kami.

Neeblas sufiĉe klarigi la signifon de tia ĉioninkluziva vorto kami per tia mallonga artikolo kiel mia. Ĉar koncepto, kiu estas tiel universala, ne povas esti klarigita per limitaj terminoj. Nur *kamigakari* povas konigi al ĉiu la veran signifon kaj koncepton pri kami.⁸⁾

Trad. T. Nakamura

6) En la fruaj Esperanto-eldonaĵoj de Oomoto, ekz-e la 'respekta' esprimo 守護神 (gardo-kami, prononcata *ŝugoŝin*) estas tradukita laŭvorte: "gardodio", sed laŭsence, ĝi devas esti tradukita: gardospirito 守護靈. Kaj en "La Rakontoj el la Spirita Mondo" de Onisaburo aperas granda nombro da kami-oj (bonaj aŭ malbonaj), kiuj tradukigis laŭvorte: "dioj" aŭ "Dioj". Sed laŭsence, ili estas la Spiritoj, el kiuj unuj estas diaj, aliaj estas malnoblaj, ktp; kaj kelkfoje eĉ homoj portas la nomon kun respekta kami, ĉar ili (kiel ni ĉiuj) estas la Spiritoj portempe enkarniĝintaj sur la tero. Pro tia japana 'respekta' kami-esprimaro, uzata ankaŭ Oomotisme en "La Rakontoj" kaj aliaj Skri-

boj, oni facile ricevus la impreson, ke Oomoto estas politeisma. Sed la vero estas ke Oomoto estas “polispiritisma”, tamen — monoteisma, kiel deklaras al la mondo i. a. la Esperanto-monumento de Oomoto: Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo.

— Noto de la Trad.

7) Mi scias nur, ke “Ananai-kjō” estas alinomo de Oomoto, kiel ĝi estas uzata en “La Rakontoj el la Spirita Mondo”, kaj ke Jonosuke Nakano, nun probable ĉ. 90-jara, estas eksdisciplo de Onisaburo. La kaŭzo de lia fondo apartan grupon en 1949 (?) ne estas konata de mi.

— Noto de la Trad.

8) En sia verko 「日本神話」 (La Nipona Mitologio) Prof. Masaaki Ueda de Kioto-Universitato atentis pri Hirata Acutane kiel “elstara, kvankam ofte mistika kaj trudema, komentariisto pri la japana mitologio”; rekonas, ke li estis leginta la Genezon kaj provis *religian* interpreton pri la rolo de kelkaj mitologiaj kami-oj; sed konkludas, ke lia finfine estas nur la reinterpretado “alte spekulativa” por “sistemigi la mitologian teologion”, kaj prof. Ueda mencias pri ia renesanco de la religiaj kami-oj:

“La kamioj de la religia mondo, kiuj estas malsamaj ol tiuj de la [tennoisme] politikumita mitologio, reviviĝis per kelkaj novaj religioj, kiuj aperis en la deknata jarcento. Nome, Miki Nakajama [la fondintino] de Tenri-kjō (1798–1887), Nao Deguci [la fondintino] de Oomoto-kjō (1856–1918), k. a. rivelis per kamigakari la proprajn konceptojn pri Kami kaj la doktrinojn, en kiuj ni ja trovas eĉ abundon da mita spirito, kiu spiradas viva per religio” (Enkonduko, p. 12)

Se oni permesas al mi esprimi mian opinion pri tio, mi povas diri, ke la gekamioj en la japana mitologio (se kompari kun la Olimpaj gedioj) estas senkarakteraj, dum la Kami de la t. n. novaj religioj elmontras kaj portas la vivan kaj fortan “karakteron de dieco” (神格) en la persono de, aŭ pere de, la respektiva fondint(in)o.

— Noto de la Trad.

La Vojaĝo al Novzelando

de D-ro S. Hori, prof. de biologio ĉe Gunma-Universitato

Presita sur bonkvalita papero, ilustrita per multaj fotoj kaj bildoj, lukse bindita. 130 p. (210×148cm). Prezo: 1000 enoj aŭ 10.— ned. guld. Mendu al: Japana Esperanto-Instituto, 113 Hongo 2-2-14, Tokio, Japanujo.

“Leginte la paĝojn, mi sentis min kvazaŭ mem vojaĝanta en la fremdaj insuloj kun abundaj ‘kuriozaj’ vidindaĵoj, kaj multon gajnis de tiu vojaĝo. Mi sentas ankaŭ agrablan simpation al la sinteno de la aŭtoro aenbride amikeca al ĉirkaŭaj personoj, fremdaj aŭ konataj, dum la vojaĝo.” — *H. Nakagaŭa*

“Estas interese eltrovi kiel nia lando kaj kutimoj impresis alinacianojn. Mi lernis multon pri mia propra lando, ĉar la aŭtoro vidis kaj vizitis lokojn kaj homojn, kiujn mi ne havis la okazon rigardi. Estas bona libro por sendado al alilandaj korespondantoj kiel donaco, kaj mi mem intencas tion fari.”

— *J. Wilson*

La Japanoj kaj la Judoj

el Isaiah Ben-Dasan : “Nihonĵin to Judajaĵin”*

Iu estas japano aŭ judo per sia naskiĝo, kaj en la plej strikta senco neniu povas “fariĝi” unu aŭ la alia. Mia propra kazo ilustras kion mi celas diri. Mi estas judo per mia naskiĝo; mi estus judo, kie ajn mi estus naskita. Kiel tio okazis, mi naskiĝis en Kōbe, Japanujo, sed tiu evento ne faris min japano, nek en la okuloj de la japana popolo, nek en la leĝa senco. Se mi estus naskita judo en Usono, kia ajnus la nacia fono de mia familio, mi estus usona civitano. Ne tiel okazas en Japanujo; mia naskiĝo havas nenian rilaton al la vera japaneco, des pli, ke eĉ civitaneco akirita estas seninflua afero en determinado, kiu vere estas japano.

Mi iam havis japanan amikon, kiu estis talenta pentristo. Antaŭ la Dua Mondmilito li edziĝis al francino, kiu poste akiris japanan civitanecon. Unu tagon mi menciis al alia amiko, ke la pentristedzino estis francino, sed nun estas japanino. Mia amiko faris al si la konkludon, ke la pentristo eksedziĝis de la francino kaj edziĝis al japanino. En lia pensmaniero, “japaniĝi” estas io malebla eĉ per akiro de civitaneco. Lia reago ne estis escepto. Dum la milito, ĝendarmoj vizitis la pentriston, por pridemandi lian ‘fremdan’ edzinon. Ili miregis ekscii, ke — almenaŭ leĝe — ŝi estas japanino. Kion ili vidis pri ŝi, tio estis eksterulo (*gaiĵin*), kiu, kiel mi mem, neniam povas fariĝi internulo. Tiu ĉi japana dispozicio etendiĝas ĝis tia ekstremeco, ke la posteularo de la koreaj ceramikistoj, kiujn Ŝimazu Joŝihiro en Kagoŝima venigis al Japanujo antaŭ 300 jaroj, ankoraŭ nun estas fremduloj.

Kiel la judoj, tiel ankaŭ la japanoj kredas je sia unikeco. Sed la japanoj havas interesan blindpunkton koncerne la unikecon de la judoj. Ekzemple, dum la Sestaga Milito, japana progresema ĵurnalisto en sia artikolo, aperinta en progresema gazeto, asertis, ke ne ekzistas tia homo, kiu estas judo; kiuj nomas sin judoj, ĉiuj estas efektive francoj, germanoj, angloj ktp, laŭ tio, en kiu lando ili vivas. (Lia argumento ŝokis min, ĉar li negas ja la ekzistadon de judoj; antaŭe la naziistoj faris ĉion, kion ili

*) Eldono de Jamamoto-Ŝoten, Tokio (1-a, 1970)

povis, por ekstermi la judojn.) Kvankam tiu ĵurnalisto opinias, ke judo naskita en Francujo estas franco, mi dubas, ĉu li lasos al mi la honoron esti japano, malgraŭ ke mi estas judo naskita en Kōbe.

Pli ol kio ajn alia, la Diasporo devigis la judojn havi la intensan senton de sia identeco kaj la fortan konscion, ke ili apartenas al aparta religia kredo. Dissemitaj sur multaj partoj de la terglobo, tamen unuigitaj kaj de la ideo pri la sinagogo kaj de la rabena tradicio, la judoj ne povis ne komparadi sin kun la alinacianoj, inter kiuj ili vivis. Tiele ili malkovris siajn proprajn trajtojn, el kiuj elvolviĝis memkonscio pri unikaĵo nomata la judeco. Kontraste al tio, la japanoj, kiuj neniam travivis tian fordisiĝon, malpli konscias la forton, kiu unuigas ilin, precipe tiun ligantan kredon, kiun mi nomis Niponismo. Ĝi estas tiel profunde penetrinta en la koron de siaj sekvantoj, ke ili eĉ ne konscias ĝian ekzistadon — rimarkinda fakto, se oni konsideras, ke ĝi estas tia solida religio, kiel Judismo, Kristanismo aŭ Islamo.

Kiel aliaj religioj, Niponismo povas esti dividita en certan nombron da branĉoj: por citi nur kelkajn, Kristana, Sōka-Gakkai (Niĉiren-Budhista), Marksista, Humanist-Kapitalista (reprezentata de la movado por “Paco kaj Feliĉo per Prospero”), ktp. Tiuj grandaj branĉoj povas esti subdividitaj en malgrandajn grupojn, el kiuj kelkaj estas ekstremistaj kaj radikalaj laŭ sia naturo. Feliĉe, la plejparto de la popolo ne tro interesiĝas pri problemoj, kiuj flamigas ekstremistojn. Ili preferas vivi la vivon inter la limoj de tradiciaj, ofte religiaj, kredoj. En Japanujo la kredoj identas kun tiuj de Niponismo, kiuj etendiĝas tra ĉiuj sferoj de homa aktiveco.

Nenio estas pli vana, ol la provo transformi kredon tiel profunde enradikiĝintan, kiel Niponismo, en alian religion; tamen Kristanaj misiistoj longe provadis antaŭenpuŝi tiun tragikomedian programon. Ilia grava eraro estas tia, ke ĝi estas apenaŭ kredebla ĉe lumo de la rimedoj, per kiuj Kristanismo triumfis en aliaj partoj de la mondo. Se paroli ĝenerale, la grandaj gvidantoj de la frua Kristana Preĝejo rekonis, kaj efike utiligis al si, kelkajn aspektojn kaj valorojn de aliaj kredoj, kiujn ili venkis. La elekto la daton de pagana germana festivalo kiel la tempon de Kristnaska festo estas nur unu el la multaj ekzemploj de tiu procedo. Aliflanke, en Japanujo ili tute preteratentis abundon da religie-bazitaj kutimoj kaj kredoj, kiujn ili povus bonuzi por sia celo. Ili eraris en tio, probable, ĉar ili, kiel multaj aliaj, inkluzive kelkiujn el la japanoj mem, englutis la misargumenton, ke la japanoj estas baze senreligia popolo. Sed neniu homa raso ekzistas, kiu estas pure senreligia, escepte se oni kreus tian per pura kulturo. Preskaŭ ĉiuj homoj tenas sin je ia kredo, eĉ se ĝi ne alprenas formon de organizita religio. Kaj la japanoj, kiel mi diris, estas fidelaj — kvankam ofte nekonsciaj — sekvantoj de Niponismo.

Al Kristanaj misiistoj, kiuj komencas konverti japanojn, mi ofte diras, ke ili unue konatiĝu kun la literaturaj verkoj, kiuj en Niponismo respondas al la Evangelio de Johano, la Libro de Genezo, Jesaja, kaj la Epistolo al la Romanoj. Ĉe tio kutime la prozelitontoj gapas, sed kiam ili retrovas sin el la embarasa malkovro, ke tiaspecaj verkoj tamen troviĝas, mi diras al ili, ke por koni pli profunde la popolon, kiun ili intencas konverti, ili devas studi la vivon kaj agojn de la martiroj de Niponismo. Ĉe tio la kristanigontoj kutime ekprenas mienon nekredeman. Sed kiu religio ne havas siajn martirojn! Mirego de la misiistoj ne malpliigas kiam mi citas la nomon Takamori Saigō kiel unu el tiaj martiroj. (En la sekvanta ĉapitro mi pritraktos ĉi tiun samurajon kaj gvidanton, sed ĉi tie sufiĉas diri, ke li estas elstara ekzemplo de martireco al Niponismo.) Mi provas fine konsoli la misiistojn: “Ne gravas! Nu, iru kaj faru misian predikon por kelke da jardekoj, kaj kiam vi fariĝos sufiĉe maljuna, japanoj probable diros pri vi tre simpatie: ‘Tiu viro estas misiisto, sed li tute ne aspektas kiel tia. Li estas bonkorulo riĉa je homeco.’” La vorto “homeco” estas la ŝlosilo, ĉar la misiisto estas traktata kiel ano de la Kristana branĉo de Niponismo, kies kerna elemento estas la homeco, ne dio. La misiisto efektive, kvankam senscie, fariĝis parto de alia religio; la japanoj restas nekonvertitaj.

Ĉar la homeco, ne dio, sidas en la centro de Niponismo, ĝia moderna Libro de Genezo legiĝus pli-malpli jene:

“Nek Dio nek la spirito kreis la homan mondon. Ĝin faris neniu alia ol tiuj nuraj homoj loĝantaj ambaŭflanke kaj en la tri domoj kontraŭflanke de la strato. La vivo en la homa mondo estas malfacila, sed troviĝas neniu alia lando por transfuĝi. Se eĉ tia lando ekzistus, ĝi estus malhoma kaj la vivo tie estus pli malfacila, ol en la homa mondo.

“Se la vivo en tiu ĉi neevitebla mondo de homoj estas malfacila, ili uzu ĉiajn eblojn por faciligi kaj travivi mallongan vivon kiel eble plej komforte. Por helpi nin en tio, jen alvokiĝas la poetoj, jen destiniĝas la pentristoj. Sankta estas la misio de ĉiuj artistoj tial, ke ili faras la homan mondon trankvila kaj la homan koron riĉa”.

La fama novelisto kaj granda intelektulo Sōseki Nacume, kiu posedis abundan scion pri la klasikajoj de Okcidento, Japanujo, Ĉinujo kaj Budhismo, kredis, ke la homoj faris la homan mondon. Liaj verkoj reflektas tiun ĉi konvinkon en tio, ke ili klarigas ĉion per lumoj de la homeco. Unu el liaj plejfrujaj kaj -konataj verkoj, *Mi estas Kato* (“Ŭagahai ŭa Neko de-arū”), satiras homojn kaj socion, rivelante ilin, kiaj ili estas rigardataj tra la okuloj de kato la protagonisto. La kato fariĝas speco de reganta spirito; troviĝas neniu dio en la libro. En la Malnova Testamento, Dio estas la reganta spirito; troviĝas neniu kato. Eblas por

Nacume videbligi sendian mondon superrigardatan de ĉioscia kato, dum en la mondo de la Malnova Testamento Dio scias ĉion, kvankam katoj notinde mankas. Tiuj estas du akre kontrastaj interpretoj pri la mondo — unu tute homa kaj la alia regata de Dio — kaj nur frenezulo provus vivi en ambaŭ samtempe.

Alia el la verkoj de Nacume, majstra rakonto titolita *Kusamakura* (Herbo-Kapkuseno), el kies komenco mi citis pecon ĉi-supre, meritas atenton ankaŭ pro tio, ke ĝi similas al Jesaja en sia kondamno al la mondo kaj profetaĵo pri diversaj malfacilaĵoj. Tamen, la filozofio, sur kiu la rakonto estas bazita, koncentriĝas entute sur homoj. Nacume skribas:

“La mondo estas plena de homoj obstinaj, venenaj, bagatelemaj, plie, ruzaj kaj naŭzaj. Troviĝas eĉ tiaj, pri kiuj neniel oni povas kompreni, por kio ili enpuŝis sian vizaĝon en la mondon. Kaj senhonta estas ilia vizaĝo! Ĝia vasta elmetiĝo al la mondeca vento signifas por ili honoron esti tiom pli konata en la mondo. Ili sekvas kvin aŭ dek jarojn spione la postaĵon de aliuloj, kalkulante ties furzojn, kaj pensas ke tio estas ilia vivo. Kaj ili venas antaŭ la aliulojn kaj donas la nepetitan informon, ke ‘Vi furzis tiom kaj tiom da fojoj’. Se ili venas antaŭ vin kaj rekte en vian vizaĝon diras, kiom da furzoj vi ellasis, tio almenaŭ estus ne tute senutila por vi. Sed ili venas malantaŭ vin kaj de post via dorso diras, kiomfoje vi furzis. Se vi diras ke ili ĝenas, ili ankoraŭ pli diras. Se vi diras ke ili silentu, ili des pli laŭte diras. Eĉ se vi diras ‘Komprenite’, ili persiste plu diras, kiom da furzoj vi ellasis. Ili pretendas ke tio estas ilia propra maniero de vivo en la mondo. Certe, ĉiu estas libera elekti sian propran manieron de vivo, sed konsilindas, ke ili havu ĝin sen diri ion pri la furzoj de aliuloj. Decas ke ili detenu sin de tia vivmaniero, kiu ĝenas aliulojn. Se tamen ili insistas ke ili ne povas vivi en la mondo sen doni ĝenojn al aliaj homoj, mi ankaŭ devos fari el la furzado mian propran manieron de vivo. Se tio plenumiĝos, la sorto de Japanujo paneos”.

Neniu rajtas paroli pri Japanujo antaŭ ol li tralegis la *Kusamakura*. Tiel mi diras al tiu aŭ alia ĵurnalisto aŭ misiisto, kiuj, loĝante nur du-tri jarojn en Japanujo, jam pretendas esti kompetentaj pri japanaj aferoj. Ĉu ili opinius sin sufiĉe kapablaj kompreni mirindan mondon en tiu verko pentritan? Ĉu ili povus eĉ imagi ke la supra citaĵo en la japana lingvo, kia ĝi sidas en la originala teksto, konsistigas tre belan poezion?

Imaginara Genezo kaj Niponista mondkoncepto kondukas min al la naturo de interkomunikiĝo en la regno de Niponismo. Antaŭ ol mi faros eblan retuŝon al la komenco de la Evangelio laŭ Johano, kiu pritraktas la naturon de la vorto, lasu, ke mi faru rakonton, kiu klarigas multon pri la maniero, kiel la japanoj uzas vortojn.

Antaŭ multaj jaroj misiisto venis al Japanujo. Unu tagon li vidis

maljunulon staranta antaŭ bronz-statuo de la Budho kaj preĝanta riverence kun la manoj interplektitaj. La misiisto diris al li: “Dio ne enestas en tiaj objektoj faritaj el oro aŭ bronzo”. Large malfermite la okulojn pro surprizo, la maljunulo diris: “Kompreneble”. Nun por la misiisto estas la vico esti surprizita; li demandis: “Se tion vi scias, kial vi preĝas antaŭ tiu statuo?” La maljunulo respondis: “Unue oni forviŝas polvon, kaj poste rigardas la Budhon. Kio estas via respondo?” La misiisto staris muta de miro, ĉar la maljunulo foriris post kiam li diris ĝentile, “Ankaŭ la Budho estas polvo”.

Kiom ajn la misiisto rompus al si la kapon, por kompreni la demandon de la maljunulo en la lumo de Kristanaj instruoj, mi dubas, ĉu li sukcesus trovi respondon. La du homoj en tiu ĉi hazarda renkontiĝo interparolas en manieroj tute nekompreneblaj al si reciproke. Pri la japana maniero troviĝas bona ekspliko de la karmemora Jasunari Kaŭabata, kiu diris en sia parolado ĉe la Universitato de Havajo, ke la japanoj interkomunikiĝas per silenta kompreno, aŭ speco de telepatio, ĉar por ili vero kuŝas en la implicita, pli ol en la dirita.

La vortoj de Kaŭabata kondukas nin al tre grava punkto de Niponismo, — punkto, kiu klarigeblas per vortoŝanĝo en la komenco de la Evangelio de Johano: “En la komenco estis la implico (t.e. vortoj ekster vortoj), kaj la implico estis kun la vorto, kaj la vorto fariĝis la implico”. Fiasko kapti la esencon de implicoj estas la kaŭzo, kial multaj fremduloj plendas, ke la japanoj neniam eldiras siajn pensojn kaj konkludojn klare. Mi timas, ke tio nur rivelas la mankon de ilia kapablo kompreni la japanan manieron de interkomunikiĝo. La mondo de la japanoj kompareblas al neeŭklida geometrio. Se iu provus apliki eŭklidajn regulojn al ĝi, li nur ridindigus sin. Simile, se li aplikus la tiel-nomatan prudentan logikon al ekzegezo de la elcitaĵo el Nacume pri furzo-kalkulado, japano ĝentile aŭskultus lin, kaj en sia propra maniero kreus ekzegezon pri la ekzegezo.

La famaj logiktranscendaj vorto-problemoj (*kōan*) de Zeno entenas en si ampleksan traktadon kaj komprenadon pri implicoj. Iliaj temoj estas sennombraj: povas temi pri budhista teksto, bronza statuo, la kolo de kato, la kapo de sardino, aŭ eĉ pri la Biblio. Efektive, la anoj de la Kristana branĉo de Niponismo lerte aplikas vortojn el la Biblio al Zenstila *kōan*. La Biblio, kia ĝi estas tradukita en la japana, estas Zeneska, sed la maniero de ĝia legado kaj interpretado estas eĉ tipe Zenisma. Ekzemple, unu japana Kristana pastro opinias, ke la renkontiĝo de Jesuo Kristo kun Pilato en la Evangelio de Johano estas superba ekzemplo de *kōan*. Kiam Jesuo troviĝas antaŭ Pilato, li diras, ke li venis en la mondon por atesti pri la vero. Pilato demandas: “Kio estas la vero?” — kaj eliras.

Kvankam la ideo de la pastro estas originala, ĝi tamen estas ankaŭ surpriza. Mi certas, ke mi trovas ĝin surpriza, ĉar mi ne komprenas sufiĉe bone Niponismen. Plena kompreno postulas kompletan regadon de la japana lingvo, inkluzive majstran posedon kaj de la vortoj kaj de la implico. Tio estas super mia kapablo; tial mi ne povas kondamni erara la japanon, kiu instruas en Kristana lernejo, ke la vero de la Biblio troveblas inter la linioj kaj ne en la teksto mem. Japanoj akceptas nur la implicojn de la Biblio; sed la implico ne estas la Biblio.

Unu el la plej malfacilaj aspektoj de la tuta situacio estas la fakto, ke la koncepto pri homeco, kuŝanta en la koro de Niponismo, ne povas esti esprimita per vortoj; ĝi ankaŭ dependas de implico por difino. Ĉar maleblas por fremduloj kompreni implicojn, tial nur la japanoj povas esti Niponistoj. Kiam Romio detruis Jerusalemon, imperiaj soldatoj enrompis en la Plejsanktejon; sed nenio, eĉ ne atombombo (nek iu potenca religio fremda!) povas enrompi la internan sanktejon de Niponismo. Neniu fremdulo povas ĝin atingi; la tuta, kion li espereble povas fari, estas kompreni la mondon el la vortoj, kiuj ĉirkaŭas kaj protektas ĝin. Iom el ĝia formo kaj konsisto kapteblas per proksima observado la japanojn, kiuj estas unu popolo kaj unu nacio ligita per unu sola religio; per studado la vivon kaj agojn de historiaj personoj, kiuj enkorpiĝas en si la signifon kaj praktikon de Niponismo; kaj per distingado la karakterizajn manierojn, en kiuj la sekvantoj de Niponismo interpretas aliajn religiojn. La resto de tiu ĉi ĉapitro estos dediĉita al pliaj komentoj pri la japana popolo kiel tuto, kaj en la sekvantaj ĉapitroj mi pritraktos la apartan kazon de sekvanto de Niponismo, kaj japanajn ideojn pri aliaj religioj.

Kvankam tio sonus strange al okcidentanaj oreloj, tamen en Japanujo tute ne estas eksterordinare, aŭdi junajn gefianĉojn diskutantaj inter si pri tio, ĉu ilia edziĝ-ceremonio prefere estu Ŝintoa, Budhista aŭ Kristana. La speco de la rito esence faras nenian diferencon, ĉar la koncernatoj estas membroj de la japana kredo, kiun mi nomas Niponismo. En Israelo, kie troviĝas la sekvantoj de Judismo, Islamo, Kristanismo kaj iom da Druzoj, la situacio tute malsamas. Ĉiu religia grupo havas siajn aŭtoritatojn, kiuj pritraktas la familiajn aferojn, kiel edziĝo, eksedziĝo, adopto, heredo, ktp. En kelkaj okazoj, troviĝas unua kaj dua religiaj kortumoj, kaj persono, kiu malkontentas decidon faritan ĉe ili, povas alvoki ordinaran leĝan proceson. En multaj rilatoj, la religiaj kortumoj similas la japanajn kortumojn pri familiaj aferoj. Efektive, por ke la japanoj ne interpretu la religian kortumon kiel ion similan al Inkvizicia tribunalo, mi kontraŭstarigas al ĝi la japanan kortumon pri familiaj aferoj, kiel ĝian similon plej proksiman. Unuigita sola sistemo da kortumoj en Israelo estas ekster la demando, ĉar tie troviĝas la apartaj religiaj kodoj — Rabena, Kristana,

Ďruza kaj Islama. Estas natura afero, ke la reguloj, kiuj preskribas la vivon de la kredantoj, diferencas de religio al religio, kaj devas kunekzisti en landoj, kiel Israelo kaj Usono. Tamen Japanujo estas preskaŭ unika en tio, ke ĝia popolo apartenas al unu komuna kredo, kiu transcendas ĉiujn aliajn religiojn, kaj tial tute ne bezonas apartajn instancojn por aliri kun aferoj, farante distingon, ĉu tiuj estas specife Ŝintoanaj, Budhanaj aŭ Kristanaj. Japana Kristana knabino, diplomita ĉe Kristana lernejo, edziniĝos laŭ Ŝintoa rito tiel pace, kiel ŝia funebra ceremonio probable estos Budhista. Tio ne strangas al la japanoj, nek montras ian mankon de ilia religia skrupulo. Ilia ŝajne eklektika dispozicio, rilate al religia ceremonio, montras ilian absolutan indiferentecon, kiu elvolviĝis el la fakto, ke la sola religio, kiun ili vere kredas en la fundo de sia koro, estas Niponismo. “Diru kion ajn vi volas, sed post ĉio dirita, ni ĉiuj estas japanoj!” estas komuna finparolo. La vorton “japanoj” en tiu diro mi ne hezitas anstataŭigi per “niponistoj”.

La leĝoj de plej multaj nacioj estas bazitaj sur religiaj kutimoj. Se popolo observas siajn religiajn kutimojn, neniu el ĝi preskaŭ neniam bezonos sin turni al ĝena proceduro leĝa. Tamen, la leĝoj kaj la religiaj kodoj diferencas inter si je almenaŭ unu tre grava rilato. Dum la unuaj povas esti nuligitaj, ŝanĝitaj aŭ amenditaj adapte al la bezono de la tempoj, la lastaj estas ĝenerale rigardataj kiel io sanktega kaj netuŝebla. Sed strange, la historio pri la naciaj konstitucioj en Japanujo prezentas interesan escepton al la kutima traktado de leĝoj.

Multaj japanoj hodiaŭ protestas bruege kontraŭ ia ajn revizio de la nacia konstitucio. Sed iliaj protestoj estas preskaŭ senmotivaj, ĉar neniam en la japana historio okazis ia revizio de konstitucio. Ekzemple, kiam la Taihō-Kodo, unue proklamita en 702, poste montriĝis ne plu taŭga por ŝanĝiĝintaj kondiĉoj, la tiamaj aŭtoritatoj ne reviziis ĝin. Anstataŭe, ili simple starigis eksterleĝajn, registarajn instancojn por pritrakti situaciojn, kiuj estas super ĝia amplekso. La fama, kaj malbonfama, Polica Komisiono (*Kebiiŝiĉō*) estis unu tia organo. Estas interese, ke la modernaj Memdefendaj Korpusoj estas ekzemplo de la samspeca afero. Ilia ekzisto estus ne “kontraŭkonstitucia”, sed “eksterkonstitucia”, ĉar oni serĉus tiel vane, kiel pene, en la nuna konstitucio eĉ unu artikolon, kiu permesus la formadon de memdefenda korpuso. Ordinare, se popolo malkovras meze inter si la ekziston de kontraŭkonstitucia armeo, ĝi postulas, ke la registaro senprokraste reviziu la konstitucion por meti tiun armeon sub klara leĝa kontrolo. Mi iam sugestis al japana amiko, ke estos bone, se oni aldonos al la nuna konstitucio artikolon, kiu diras :

“La Memdefendaj Korpusoj estos provizora organizo por defendi la landon. La limoj de iliaj aktivecoj estos jenaj: la Tera Memdefenda

Korpuso estos limigita al la nacia teritorio de la Japana nacio. La Mara Memdefenda Korpuso estos limigita al la teritoria maro de Japanujo kaj al specifita internacia maro. La Aera Memdefenda Korpuso estos limigita al la aerspaco super la specifitaj zonoj de aktiveco de la Tera kaj Mara Memdefendaj Korpusoj”.

Mi diris al mia amiko, ke tia modifo de la konstitucio inspiras la senton de sekureco ne nur en Japanujo, sed ankaŭ en najbaraj landoj, kaj helpas malpliigi la danĝeron de ebla miskompreno. Lia respondo ja estis plej ilumina: “Jes, vi eble pravas, sed en moderna Japanujo oni ne povas tuŝi la konstitucion”. Kion li diris, tio ne estas teorio, sed fakto. La japanoj neniam tuŝas siajn konstituciojn. La Meiji-Konstitucio, proklamita en la lasta duono de la deknaŭa jarcento, estis leĝa kodo, destinita, ke ĝi estu valida por ĉiam. La nuna konstitucio estas granda dokumento pri la paco. Ambaŭ konstitucioj enhavas klaŭzojn pri revizio, sed la klaŭzoj mem estas malplenaj vortoj pri plej neverŝajna eventualaĵo, ĉar la konstitucioj de Japanujo ne estas leĝaj kodoj, sed religiaj klasikaĵoj de Niponismo. Eĉ sankteĝaj religiaj kodoj iĝas eksmodaj kaj, ĉar nerompeblaj, necesigas onin fari interpretadon por alkomformigi ilin al la tempoj. En la tempo de Jesuo, fariseoj kun variaj gradoj de strikteco plenumis ĉi tiun servon. En moderna Japanujo, certaj grupoj, kiel la antikvaj fariseoj, okupas sin pri interpretado de la konstitucio, dum ili laŭte atakas la kontraŭkonstitucion de ĉiuj oponentaj grupoj. Iliaj disputoj, kiel tiuj de la antikvaj teologoj, estas io plej malproksima de tia malvarma debatado, kiu devus akompani leĝan reformon. Sed tio ne mirindas, ĉar la konstitucio, pri kiu ili argumentas, ne estas leĝa kodo, sed religia kredaro. (*Datrigota*)

Trad. T. Nakamura

Utafesta Poemaro

Bind. 105p. 720 enoj aŭ 7,20 nd. gld

Ĉi tiu poezia libro eldoniĝis je la 1-a datreveno de l' Oomoto-Internacia Festivalo kun 29 poemoj elektitaj el ĉiuj kontribuaĵoj de la Utafesto. Ĝi konsistas el du partoj: Parto I entenas la poemojn premiitajn kaj tiujn elektitajn por “Laŭdo”, kun la portretoj de la laŭreatoj; Parto II entenas 15 poemojn poste elektitajn por pliriĉigi la enhavon de ĉi tiu memorlibro. — mendu ĉe Oomoto aŭ UEA

La Ideo de Sōseki Nacume pri Religio kaj Dio

En septembro de 1900 Sōseki Nacume, komisie de la japana ministrejo de publika instruado, forveturas ŝipe de Jokohamo al Londono por dujara studo. Kiam la ŝipo ankriĝas ĉe Ŝanhajo, enŝipiĝas ĉ. 20 anglaj kaj usonaj misiistoj kaj familianoj. Kelkaj el la misiistoj “fidele al sia misio” komencas predikon al Nacume kaj kvar aliaj japanoj, kiuj ankaŭ forveturas por studo eksterlande, sed ĉiu al sia aparta destino.

Laŭ la “Rememoroj pri Nacume” de Sojin Hujiŝiro, unu el la tiamaj kunvojaĝantoj, Nacume tiam diskutis kun la “misiisto, kiu celis lin kiel plej reagan, sed kiun li fine metis en embarason, argumentante el sia filozofia vidpunkto”. Laŭ la “Taglibro” de Jaiĉi Haga, alia kunvojaĝanto, “S-ro Nacume diskutis kun la misiisto kaj tiun li ege malsukcesigis je mia plezuro”.

Kaj Nacume resumas mem anglalingve sian vidpunkton pri Dio kaj religio, esprimitan en tiu okazo. Tiu verketo restas kiel unu el la “Fragmentoj”, kiujn li postlasis. En mia esp-igo ĝi tekstas :

“Tiuaj karaj personoj havas plenan

konvinkon, ke ili estas ikonoklastoj ; samtempe ili ne hezitas diri, ke Kristo estas la enkarniĝo de Dio. Dio povas havi signifon por ili nur en Kristo. Dio en si mem aŭ en sia absoluteco ne sufiĉas por ilia karnula intelekto por havi klaran koncepton pri li. Dio en Kristo, Dio en sia enkarniĝo estas necesa por ilia kredo, ke ili formu palpeblan grundon por sin apogi. Ĉu tio, iusence, ne estas idolkulto ? Ili insistas pri la ideo pri unu superega Dio. Bone. Sed ĉu tiam tiu ideo ne varias laŭ diversaj konfesioj ? Ili diras ke Kristanismo estas la sola vera religio en la mondo, sed se ĉiu konfesio alte tenas, kiel veran, sian propran ideon pri la Superega Dio, tio samas, kiel diri, ke ĉiuj aliaj konfesioj estas falsaj, kaj Kristanismo estas la vera religio nur por ĉiu aparta konfesio koncernata. Mi ne havas malbonvolon kontraŭ Kristanismo ; kontraŭe, mi firme kredas ke ĝi estas granda religio, kaj tiuj, kiuj havas kredon en ĝi, certe povas esti savitaj per ĝi. Dume, tiuj, kiujn ili nomas idolanoj, povas same trovi savon per sia maniero de adorado, neniel tia kruda, kondiĉe ke ili havu sinceran kredon en ĝi. Religio

finfine estas la afero de kredo, ne de argumento nek de rezonado. Kiel ajn granda la koncepto, kiel ajn profunda la rezonado, ĝi estas nur ludilo, belega por rigardo, sed neevitebla renversiĝi ĉe la unua bato de la vento, kiu povas ĉiam ekblovi. Ĉar ĝi estas nur aerkastelo havanta nenian solidan bazon por subteni ĝian grandiozan superstrukturon. S-кта Petro konstruis sian preĝejon de Romo sur la roko, kiu signifas kredon, nenion pli ol kredon, en mia opinio. Kie estas kredo, tie estas religio, tie estas feliĉo, ripozo kaj savo. Fetiŝismo ne estas malpli bona, ol Kristanismo. Ĉio estas ĝusta dum troviĝas kredo en ĝi. Se mankas kredo, Budhismo, Mahometismo aŭ Kristanismo estas nenio pli, ol inĝeniaj elpensadoj de saĝuloj absorbitaj en siaj flugoj per fantazio kaj povo de spekulativo. Lasu homojn kredi en ĉio, kio estas bona kaj vera en iliaj okuloj, kaj ĉiu laŭ sia etapo de intelekta evoluo, tiel, ke ili povos trovi en ĝi kontenton kaj feliĉon. Lasu mian religion esti tia, ke ĝi akceptas ĉiun alian religion interne de sia transcenda grandeco. Lasu mian Dion esti tiu nenio, kiu efektive estas io, sed kiun mi nomas nenio, ĉar, estante absoluta, ĝi ne povas esti nomita per termino entenanta relativecon; jen kio estas nek Kristo, nek Sankta Spirito, nek io ajn alia, sed samtempe Kristo, Sankta Spirito kaj ĉio.

“Unu el miaj amikoj, kies kapo estas hardita per fortaj likvoroj, deprenas marko-pecon de bierbarelo, iras al unu el la misiistoj, kaj levante tiun pecon, diras: ‘Tio ĉi estas mia Dio’.”

Mi opinias, ke la religia ideo de Nacume, tradukita ĉi-supre, restis preskaŭ la sama ĝis la fino de lia vivo (m. 1916). Por pli bone kompreni lian koncepton pri Dio kaj religio, vivo kaj morto, ktp, necesas, ke oni trastudu lian Kompletan Verkaron. Lastatempe mi havis okazon relegi parton el liaj “Leteroj”; tiam unu parto aparte kaptis mian atenton. En sia letero adresita al iu Kōzō Hajaŝihara (dat. 14.11.1914) Sōseki traktas la demandon pri vivo kaj morto, kaj skribas i.a.: 私は意識が生のすべてであると考え、同じ意識が私の全部とは思はない死んでも自分〔は〕ある、しかも本来の自分には死んで始めて還れるのだと考えている (Mi rigardas la konscion kiel tuton de la vivo, sed ne tiun saman konscion kiel mian tuton; eĉ post morto mi estos, kaj mi pensas, ke nur per morto mi povas refariĝi mia propra Memo). T. e. per natura morto, ĉar samloke (kiel aliloke) li rifuzas al si memmortigon. En la lastaj jaroj de sia vivo, li atingas filozofian komprenon pri la vivo, kiun li resumas per kvar kanĵioj: 則天去私 (Laŭ [la Vojo de] la ĉielo, for la memo).
T. N.

La Pinbosko de Anykščiai

(fino)

Tradukis Klemensas Naudzius

Kelkaj klarigaj notoj

La nomo de la poemo — “La pinbosko de Anykščiai” — fakte ne temas pri malgranda arbareto. La litova vorto “Šilelis” (pinarbareto) ne estas diminutivo, sed karesa formo, tre ŝatata en la litova poezio, precipe en la popola.

Kelkaj literatur-esploristoj trovas, ke la poemo alegorie prezentas la carisman premon: ke la tragedia sorto de la arbaro de Anykščiai al la poeto estas la sorto de Litovio mem, iam estinta libera kaj potenca ŝtato, kiu en daŭro de la tempo perdis sian sendependecon kaj restis premata de la servutismo kaj rusa carismo. Se eĉ tiel, la poeto kontentiĝas nur menciigi faktojn de tiu sklaveco (legu la du lastajn alineojn), sed antaŭvidas neniun savan rimedon, des pli, ke tio ne estus “sendanĝera ludo per rimoj” en tiu malhela epoko.

La poemo unuan fojon estis publikigita en Litovio en 1860 kaj 1861. La tiama rusa registaro en 1864 malpermesis presi ian ajn litovan presajon, kaj tio daŭris ĝis 1904. En 1875 la poemo aperis en la scienca verko “Litauische Studien” de L. Geitler, priv. docento ĉe la universitato en Praha. Post sep jaroj ĝi estis eldonita de Hugo Weber (helpe de la aŭtoro) en “Ostlitauische Texte”. 1892 kaj 1904 oni ĝin publikigis en Usono. Kaj nur de 1905 — denove en ĝia hejmlando.

Estas sendube, ke la poemo respegulas la tiaman sopiron de la popolo pro la perdita libera vivo en praaj arbaroj, kiel vivadis la antikvuloj, kiuj preskaŭ ĉiupaŝe restigis pratempajn postsignojn. Malgraŭ ke la kristanigantoj de la litovoj penis neniigi ĉiun eĉ la plej etan signon de ilia estinta kredo pagana, tamen daŭre restis ties restaĵoj en kantoj, legendoj kaj fabeloj. Ni vidas, ke la aŭtoro de la poemo ne preteriras ilin senrimarke, — li almenaŭ aludas jen tiun, jen alian mitologiaĵon.

Sen koni ĉi folklorajojn la leganto ne perceptos nete la ideojn mem, kiujn la poeto prezentas per tiuj kurtaj aludoj. La plej interesa estas la legendo “Piceo, la reĝino de kolubroj” (vd. Oomoto, n-ro jan.-feb., 1972), menciita en la linioj 69-76. Jen ĝia enhavo:

Iam, en tempo praa, apud maro vivis maljunulo kun sia maljunulino. Ili havis dekdu filojn kaj tri filinojn. Foje la filinoj banis sin en la maro. Kiam ili eliris el la akvo por sin vesti, la plej juna filino, laŭnome Piceo, en maniko de sia ĉemizo trovis kuŝi kolubron. Kiam la fratinoj penis forpeli ĝin, ĝi homvoĉe ekparolis al Piceo, ke ĝi foriros nur tiam, se ŝi promesos edziniĝi al ĝi. La knabino vole-nevole devis promesi. Post tri tagoj al la gepatroj grandamase rampvenis kolubroj-svatantoj kaj ekpostulis la fianĉinon. La gepatroj, dezirante savi la filineton, penis eĉ trompi ilin (anstataŭ ŝi, donante jen ŝafinon, jen anserinon, sed kukolo ĉiufoje avertis la kolubrojn pri la trompo) tamen fine devis cedi kaj larmante forakompagnis sian Picenjon. Sur la marbordo atendis ŝin bela junulo — li estis tiu sama kolubro, kiu embuskis en ŝia ĉemizo. Tuj la gefianĉoj kun sia akompanantaro descendis sur la marfundon, kie la kolubro havis belegan palacon, kaj baldaŭ festenis geedziĝan feston.

Bonfarte pasis jaroj. . . Piceo jam havis du filojn kaj filinon. Foje unu filo ekinteresiĝis pri la patrinaj gepatroj, kaj ŝi ekdeziris viziti ilin. La edzo longe kontraŭstaris tiun ĉi ŝian deziron (eĉ elpensante diversajn tre spritajn kaj preskaŭ nevenkeblajn obstaklojn), tamen fin-fine devis konsenti lasi ŝin kun la geinfanoj surteriĝi, samtempe instruinte, kiel ŝi voku lin el la maro, hejmenrevene, sed avertis — al neniu diri la alvokon!

La gehejmanoj de Piceo ne volis lasi ilin reveni al la kolubro kaj intencis nepre sciigi pri la sekreto, kiel elvoki ŝian edzon, celante pereigi lin.

Ambaŭ filoj de Piceo, eĉ malgraŭ punoj, diris nenion, tamen la filineto ektimis vergobaton kaj malkaŝis ĉion. La tuta frataro tiam venis al la maro, elvokis la bofraton kaj mortigis lin. Kiam la kolubredzino mem kun siaj geknaboj ekiris hejmen kaj krivokis la edzon, alnaĝis ties sangoŝaŭmo — anstataŭ atendata, kiel estis interkonsentite laktoŝaŭmo — kaj voĉo sciigis, ke la filineto perfidis lin, kaj la bofratoj senvivigis. . .

Tiam la kolubredzino — pro grandega kordoloro — faris juĝdecidon transformiĝi en arbojn, antaŭ ĉio verdiktante pri la filino feblanima:

“Vi transformiĝu en tremoleton,
Ĉiam tremetu tagon nokteton,
Pluvo prilavu la vizaĝeton,
Vento elkombu vian kapeton,

Filoj, vi iĝu arboj fortikaj,
Mi, via panjo, iĝos piceo”.

Tiel ekestis en Litovio ĉi tiuj arboj: ĉiam verda piceo, kverko kaj frakseno fortuloj, kaj pro la teruro eterne tremanta tremolo.

La linio 78 — “Sian fratinton akuzas svelta kornusarbedo” aludas alian popollegendon :

Estis du fratinoj. Alrajdis svatantoj. Ambaŭ fratinoj estis belaj, ambaŭ dezirindaj. La fianĉigonto ne povis elekti kaj lasis ilian patrinon, ke ŝi tion ĉi juĝu. La patrino sendis ambaŭ filinojn por kolekti berojn : kiu pli rapide plenigos sian korbeton, tiu edziniĝos. Sukcesis la pli juna. La pli aĝa pro envio mortigis la fratinton kaj ŝovis ŝin sub herbokovritan terkruston. Sur tiu ĉi loko elĝermis kornuso. La pli aĝa, al neniu malkaŝinte kion ŝi faris, edziniĝis. Ŝi havis filon muzikiston. Foje tiun vojon, preter la kornuso, veturis gastoj de geedziĝa festo. Al la muzikisto rompiĝis la violonarĉo. Kion li faros? Li rompis ĉi kornuseton kaj fleksfaris arĉon. Kiam li ekludis, la violono — ho, miraklo! — komencis homvoĉe klarvorte plori kaj reciti la tutan historion. Vidu, tio estis ne kornuso, sed la pli juna fratino, senvivigita de la pli aĝa. Tiamaniere evidentiĝis la vero.

La 91-a linio. Merĉiupis, tradukite esperanten, estas “Bofilinrivero”. Tiu ĉi rivereto fluis meze tra la arbaro; ĉe la apudkuranta vojo sin trovis kelkaj ŝtonegoj. Ankaŭ pri ili la popolo sciis legendon.

En praa tempo bofilino (dumokaze, fianĉino), pekinte kontraŭ sia patrino kaj ne pardonpetinte ŝin, veturis por akcepti geedziĝan bonon kaj estis de la dioj punita. Ŝi mem kaj kun ŝi ankaŭ la fianĉo kaj ĉiuj svatantoj estis aliformitaj en ŝtonojn. Jen tiuj ĉi grandaj ŝtonoj dum centjaroj kvazaŭ predikis al la junaj generacioj averton kontraŭ malestimo kaj malobeemo al la gepatroj.

Leginte la 96-an linion: “Trunko batiĝas al trunko kiel kanoj luliĝas”, — ne seninterese estos koni ankaŭ la noton de la aŭtoro koncerne ĉi esprimon : “Ĉi tiun priskribon de pinetoj la unuan fojon mi aŭdis de mia onklinjo en 1858. Tiuj ĉi vortoj montriĝis al mi tiel belaj, ke venis al mi la ideo meti ilin en kanton. El ĉi zorgo ekĝermis la ĝermo de “La pinbosko de Anykŝĉiai”.

Ĉi okaze endas rimarkigi, ke la menciata ĝuo ne estas samtiel evidenta en la traduko, ĉar la esperanta “bat(iĝ)i” (aŭ “tuŝegi”) ne ampleksas la nocion de la litova “Plakti”, kiu signifas ne nur bati, marteli, aligi, batmik-si, sed ankaŭ plaŭde-frapi (kiel ondoj al bordo), flagri (kiel flago en vento) k. s.

Fino

Mikolaj Koperniko

okaze de la 500-a datreveno de lia naskiĝtago

MOTO : *Praktiki la sciencon povas nur la homo en spirito libera.* El Alkinous

En ĉi tiu jaro la tuta mondo festos sub la patroneco de Unesko la 500-an naskiĝdatrevenon de Mikolaj Koperniko (1471-1543), eminenta pola scienculo, astronomo, matematikisto, ekonomikisto, kuracisto kaj kreinto de la heliocentra teorio de la mondo. Li naskiĝis en Torun (Norda Pollando) kaj studis en Krakovo, poste en Bologna, Padova kaj Ferrara (Italujo).

Jam en Krakovo (1491-1495), ĉe fama Jagellona-Universitato, li studis la natursciencojn kaj filozofion, kaj eniris en la kampon de esploroj karakterizaj de tiu epoko. Li skribis tiam: “Me genuit Thorunna, Cracovia me arte polivit”.

Alpropriginte al si multajn pensojn de Aristotelo, li diris, ke “oni devas esti dankema ne nur al tiuj filozofoj, kiuj trafe instruis, sed ankaŭ al tiuj, kiuj diris maltrafe, ĉar ankaŭ la scio de erarvojoj ofte utilis por tiuj, kiuj deziris iri sur la ĝusta vojo”. La

scion akiritan en Krakovo Koperniko pliprofundigis en Italujo, kie en la turnopunkto de la du jarcentoj XV-a kaj XVI-a, rapide estis efektivigitaj la renesancaj kaj humanistaj metamorfozoj.

De 1510 li restadis en Fromborg, laborante en sia propra astronomia observatorio. En la sama jaro li prezentis fundamentan skizon de la heliocentra teorio “Commentariolus” (nepresita). En 1543 aperis lia ĉefa verko “De revolutionibus orbium coelestium” (Pri la rivoluo de la ĉielaj sferoj), kiu faris la revolucion en la scienco kaj en la tiamaj mondkonceptoj. Laŭ la kopernika teorio la centra astro de la planeda sistemo estas ne la Tero, sed la Suno. Ĉirkaŭ la Suno cirkulas ĉiuj planedoj kaj kune kun ili ankaŭ nia Tero.

Hodiaŭ ni ne imagas al ni la Universon kiel la kreaĵon finitan kaj ridigiĝitan, sensanĝan en ĝia harmonio. Ni scias, ke ĝi ŝanĝiĝas senĉese,

simile al rivero konstante fluanta. Ĉu tio estas efektive la vera vero, oni ne scias. La historio de la scienco montras, ke la lasta scienca malkovro ne ĉiam estas la vero. Sed dum la hodiaŭaj disputoj pri la strukturo de la Universo la nomo Koperniko aperas tiel ofte, kiel dum la disputoj de la scienculoj en la XVI-a kaj XVII-a jarcentoj.

Albert Einstein en sia libro "Evolucio de la fiziko", skribita kune kun pola fizikisto Leopold Infeld, asertis, ke la batalo de Koperniko kontraŭ la koncepto de Ptolemeo estis sensenca, ĉar laŭ la relativeca teorio la elekto de ĉi tiu aŭ alia sistemo estas nur la afero de konvencio koncerne la diversajn sistemojn de la koordinatoj. Oni respondis tiam al Einstein, ke li eraras, ĉar preskaŭ tuta materio en la Suna sistemo koncentriĝas en la Suno, kies maso estas 330-miloble pli granda ol la maso de la Tero kaj 750-oble pli granda ol la maso de ĉiuj planedoj kune.

En la Universo — asertas la defendantoj de la kopernikanismo, — la Suno estas privilegiita, ĉar en la Suna sistemo estas observataj egale la leĝoj de gravita kampo, kiel la speciala relativeca teorio. Do la Teorio Relativeca de Einstein ne forĵetas la heliocentran sistemon de Koperniko, sed akordiĝas kun tiu,

kiel kun la koncepto difinanta la elekton de ĝusta sistemo de la interrilatoj.

La teorio kreita de Koperniko estis tute kontraŭdira al la bildo de la realeco, kiun al ni transdonas niaj sensoj. Ĉi tion bone komprenis Koperniko. En sia letero al la papo li skribis, ke lia verko eble ŝajnos al li (papo) sensenca.

En sia verko "Pri la revoluo de la ĉielaj sferoj" li atentigas, ke rigardante de sur la Tero la Ĉielon, ni estas konvinkitaj, ke la tuta mondo turniĝas ĉirkaŭ ni, ĉirkaŭ la Tero. Tio estas vidiluzio simila al tia, kian ni observas forveturante el la haveno: tiam al ni ŝajnas, ke la urbo forkuras malantaŭen kaj ĉiuj objektoj sur la ŝipo staras senmove.

M. Koperniko apartenis al la plej eminentaj scienculoj de la Renesanco, kiuj, ĝuste kompreninte la esencon de la homa scio, asertis, ke la fundamenton de tiu ĉi scio formas du faktoroj: la sperto kaj la intelekto, kies kompakta kunlaborado estas necesega por koni la realecon. Koperniko komprenis, ke la homa intelekto, ricevante la impresojn pere de la sensoj, ne estas pasiva, sed prilaboras la informojn, kiujn al li transdonas la sensoj.

Antaŭ ol la scienculoj povis sin helpi per la lorno aŭ la mikroskopo, la homa penso estis unusola instru-

mento, per kiu oni povis preni kritikan pozicion rilate al ĉiutagaj observadoj.

La astronomaj instrumentoj de Koperniko ne diferencis de tiuj, kiujn uzis la antikvaj astronomoj. Do tiaj instrumentoj povis erarigi ne nur la polan astronomon, sed ankaŭ multajn aliajn astronomojn antaŭ kaj post li. Do oni ne povas miri pro tio, ke Koperniko koncentris tiel multe da penoj por la perfektigo de la principoj de pensado. Li komprenis, kiel ni hodiaŭ, ke la ideoj naskiĝas el la spertoj, tamen la sensaj impresoj ne estas de ni akceptataj pasive, sed ĉiam okazas tio, kion Marsilius el Padova, itala verkisto de XIV-a jc. nomis “sensata experientia” (pripesata eksperimento). Tiamaniere ĉiu ekscia rigardo sur la realecon konsistas egale el la sensaj elementoj, kiel el la intelektaj.

Jam Kant kaj liaj sekvantoj proklamis, ke nia intelekto sintezas nur “la materialon liveritan pere de la sensoj”. Poste tamen montriĝis, ke tiu “materialo” implicas jam intelektajn elementojn. Tio instigis nuntempajn filozofojn ree pripensi la ideon de la limoj dividantaj inter “empiriismo” kaj “racionalismo”.

Do, se prava estas la opinio, ke M. Kopernikon oni devas nomi pli konvene pensulo ol astronomo, ĝuste estus nomi lin la kreinto ol malkov-

rinto de la heliocentra teorio, ĉar la vorto “malkovri” sugestas pasivan rilaton al la realeco, dum “krei” signifas pliriĉigon al nia scienco dank’ al la aktiva teniĝo rilate al la mondo.

En la enkonduko al sia verko s. t. “*Tabulae Rudolphinae*”, granda astronomo Kepler, unu el la plimalfruaj eminentaj kreintoj de la moderna astronomio, nomis Kopernikon “la homo de la plej granda intelekto, de la libera intelekto (animo liber).

La teorio de Koperniko ne estas nur astronomia kaj matematika. Ĝi estas ankaŭ profunde filozofia, montranta ankaŭ la pozicion de la homa individuo kaj de la homindividuaro en la mondo. Ekde tiu tempo la homo, nome, post la ŝanĝo de sia pozicio en la Universo, ne povis jam pretendi je sia escepta rolo en ĝi (en Universo), ĉar el la kopernika heliocentra teorio rezultas multo da mondoj. Tia teorio devis ŝanĝi antaŭ ĉio la pozicion de la homo en nia heliocentra sistemo. La tasko de ĉiuj sciencoj, — skribis Koperniko en sia verko *De revolutionibus orbium coelestium* “— estas deturni la homon de la malbono kaj direkti lian intelekton al pli granda perfekteco”. Tio malfermis novan perspektivon por plibonigo de la ĝistiam homa vivo.

Sendepende de tiu aŭ alia nomo, kiun oni donis aŭ donas nun al granda pola astronomo, la vera senco de la

La naturaj faktoroj de kuracado (4)

Tiu frotado estas deiriga apliko, kiu ĉefe pere de la nervaj fibroj de la haŭto forte influas la internajn organojn, precipe la renojn kaj la intestojn. Sekve de tio seninflamiĝas la abdomenaj organoj, pliiĝas la kvanto de urino kaj la peristaltaj intestaj movoj kun vigla eliminado de organismaj malpuraĵoj. Krome ĝi influas la sangcirkuladon kaj la nervaron kun favora reefiko sur multajn malsanojn.

Jen variaĵo de tiu frotado: Anstataŭ meti tabulon *sur* la kuvon, enmetu *en* ĝin benketon, tiamaniere, ke du fingroj da akvo kovru la benketon. Kiam la paciento sidiĝas, do, lia postaĵo trempiĝas en tiuj du fingroj da akvo. Cetere la frotado mem estas ekzakte la sama. Tiu variaĵo estas indikita ĉe rektumaj kaj anusaj afekcioj: hemoroidoj,

kopernika malkovro daŭre restas senŝanĝa: sendepende de la loko, en kiu devas vivi la homaro inter miliardoj da astroj, la homo kapablas — per la forto de siaj intelekto, imago kaj fantazio, kiuj ĉerpas sian vivoforton el la observado, — krei la verkojn, indikantajn la vojon por multaj generacioj, kiuj per komuna peno

fistuloj, k. t. p. Se la hemoroidoj estas grandaj kaj doloraj, la akvo ne devas esti tro malvarma.

Tutkorpa frotado. — Vi mem aŭ prefere helpanto devas energie frotadi vian korpon dum 2 minutoj per spongo aŭ tuko ofte trempita en akvo kaj apenaŭ premtordita laŭ tiu-ĉi vico: la krurojn, la brakojn, la ventron, la bruston kaj la dorson. Tuj poste sekiĝu kaj, se vi estas malforta, enlitiĝu.

Malvarma, ĝi hardas kontraŭ oftaj malvarmumoj kaj fortigas la korpon.

Malfortuloj kaj ĝenerale tiuj, kiuj ne bone eltenas malvarman akvon, faru ĝin apenaŭ tepida.

Varma, ĝi tre utilas ĉe kronika nefrito, uremio, k. t. p., ĉar ĝi draste stimulas la funkciadon de la haŭto, kiu certagrade plenumas la

formas novan, pli kaj pli perfektan bildon de la Tero. Intelekta aventuro, kiun travivi la sorto permesis al Koperniko estis la evento, kiu en la historio de la scienco okazas unufoje dum centoj da jaroj kaj tial ĝi vekas admiron ankaŭ hodiaŭ, kiam, dum la vivo de unu generacio, efektiviĝas tiel multaj kaj gravaj eltrovaĵoj.

taskon de suplementa reno.

Frotado per salo. — En ujon kun iom da malvarma akvo enmetu 1 aŭ 2 manplenojn da kruda salo por ke ties eĝoj kaj akraj elstarajoj iom malakriĝu, sed evitu, ke ĝi solviĝu.

La paciento, tute nuda, devas stari en pelvo kun varma akvo en sufiĉa kvanto por atingi liajn piedojn ĝis la maleoloj. La helpanto prenas manplenen da tiu trempita salo kaj frotadas la korpon de la paciento laŭ jena vico: maldekstra kaj dekstra brusto kaj dorso, maldekstra kaj dekstra flankoj, ventro kaj lumboj, maldekstra kaj dekstra gamboj. Tuj poste, pere de tolaĵo aŭ viŝtuko trempita en abunda malvarma akvo, li viŝas la korpon laŭ la sama supre indikita vico. Ĉio-ĉi devas esti rapide farata, dum 5 aŭ 6 minutoj. Fine li sekigas la pacien-ton per seka viŝtuko, kaj lin enliti-gas dum duonhora por revarmiĝo.

Kiel supre dirite, la piedoj de la paciento, ĝis la maleoloj, devas esti mergitaj en varma akvo dum la tuta tempodaŭro de la frotado, kaj, ĉe la fino, li devas enlitiĝi dum duonhora. Nur tiel la reago estos bona.

Se temas pri infaneto, uzu tablan (muelitan) salon malsekigitan per malvarma akvo anstataŭ kruda salo, kiu povas difekti lian delika-tan haŭton.

La frotado per salo estas efiko-plena fortigilo, stimulas la apetiton, k. t. p. Oni povas ĝin fari 2 aŭ 3 foje semajne.

Ŝprucigoj. — Pere de ŝprucigilo

aŭ kaŭĉuka tubo aŭ rekte de la krano aŭ uzante la bideon, oni ŝprucigas akvon, ĝenerale malvar-man, sur la indikitan korpoparton de la paciento, dum 2-3 minutoj.

Sur la gambojn aŭ krurojn, la ŝprucigoj utilas ĉe varikoj; sur la skroton, ĉe skrotovariko; sur la anuson, ĉe hemoroidoj; sur la viza-ĝon, ĉe inflamo aŭ kongesto de la okuloj, de la fruntalaj kaj maksilaj sinusoj, k. t. p.; sur la kranion, ĉe kapdoloro, kapkongesto, migreno, k. t. p.

La ŝprucigoj kapablas influi reflekse eĉ malproksimajn organojn. Ekzemple: ŝprucigo sur la plandojn normaligas la sangcirkuladon ĉe la abdomenaj organoj kaj kontribuas en la kuracado de uteraj hemora-gioj.

Paŝadi nudpiede sur la malseka grundo. — Tiu-ĉi simpla hidrotera-piaĵo tre utilas al tiuj, kiuj suferas de malvarmaj piedoj, kapdoloroj, astmo, perturboj en la urina cisto, en la utero, k. t. p. Ĝi ankaŭ influas reflekse la renojn kaj la intestojn, favorante ties funkciojn, kaj plifor-tigas la tutan nervan sistemon.

Ĝi konsistas en paŝadi nudpiede (sed cetere varme vestita, se mal-varmas) sur la malseka grundo, prefere sur la gazono aŭ herbotapiŝo kovrita de la matena roso; aŭ sur la malseka bordo de maro, lago, kanalo aŭ rivero; aŭ simple sur la tera grundo, aŭ sur planko tegita per brikoj, ŝtonoj, mozaikoj aŭ kaheloj antaŭe malsekigitaj per abunda malvarma akvo.

Komencu paŝadi dum 1 minuto la unuan tagon, kaj aldonu 1 minuto ĉiun sekvantan tagon ĝis atingi, post 15-20 tagoj, 15-20 minutojn, kaj tiam daŭrigu tiun tempodaŭron ĉiutage.

La plej konvena horo por tion fari estas frumatene, ĉe ellitiĝo; tamen, se tio ne eblas, faru ĝin dum la tago, almenaŭ 3 horojn post manĝo.

La efikeco de tiu apliko ŝuldiĝas ne nur al la agado de la malvarma akvo, sed ankaŭ al la rekta kontakto de la piedoj kun la elektromagneta energio de la tero, kiun la homa organismo nepre bezonas por la ekvilibro de sia sano, kaj disde kiu li estas ordinare izolita per nilonaj (aŭ el aliaj artefaritaj materialoj) ŝtrumpoj, ŝuoj el plasto aŭ el kaŭĉuko, k. t. p.

Samtempa varma krur- kaj antaŭbrakbano. — Metu sur la plankon sitelon aŭ alian taŭgan ujon plenan je akvo tiom varma kiom nur eble elteni. Metu sur tablon aŭ benkon alian ujon (pelvon aŭ alian vazon prefere iom longforman) plenan je akvo samtemperatura. Enigu ambaŭ kruojn ĝis preskaŭ la genuoj en la surplankan ujon; sammomente enigu la manojn kaj antaŭbrakojn ĝis la kubutoj en la surtablan ujon. Por ke la akvo ne malvarmiĝu, aldonu laŭbezone pli varman akvon al ambaŭ ujoj. Tiu bano devas daŭri pli-malpli 10 minutojn. Se ĝi estas bone elportebla, ĝi povas daŭri 12-15 minutojn, kaj oni povas ripeti ĝin 2-3 foje en la sama tago, se necese; kontraŭe, oni devas ĝin

ĉesigi post 6 aŭ 8 minutoj.

Tiu-ĉi bano bone utilas al astmuloj kaj al suferantoj de malforteco kaj nesufiĉeco de la kormuskolo, ĉar ĝi forte plivigligas la sangancirkuladon.

Alternativa membrobano. — Metu sur la plankon du sitelojn aŭ aliajn taŭgajn ujojn. Plenigu unun el ili je akvo tiom varma kiom nur eble elteni, kaj la alian je malvarma akvo. Enigu ambaŭ kruojn (aŭ manojn, antaŭbrakojn, laŭbezone) ĝis preskaŭ la genuoj en la varman akvon dum 3 minutoj; tuj poste en la malvarman akvon dum 1 minuto. Ripetu la samon kvarfoje: varma-malvarma, varma-malvarma, varma-malvarma kaj varma-malvarma. Ĉiu varma bano daŭras 3 minutojn kaj ĉiu malvarma bano 1 minuton. Oni faras unun senprokraste post la alia, kaj la lasta estas la malvarma. Ĉio daŭras sume 16 minutojn. Por ke la varma akvo ne malvarmiĝu, aldonu laŭbezone pli varman akvon al koncerna ujo.

Tiu alternativa bano forte pli vigligas la sangancirkuladon, malplivigligas la altan sangopremon kaj estas tre efikoplena ĉe arteriito (intermita lamado), arteriosklerozo, frostoŝvelo (pernio), malvarmaj piedoj, k. t. p.

Similmaniere, pere de 2 grandaj kuvoj, oni povas preni alternan sidbanon, kiu estas rekomendinda ĉe hernioj, ptozo (malaltiĝo) de reno kaj intestoj, stomaka dilatiĝo, k. t. p.

(*Daŭrigota*)